


# LA JUNA VIVO

MONATA ORGANO  
POR LA

JUNULARO KAJ  
KOMENCANTOJ



Redakcio kaj Administrado:  
West-Graifdijk (N.H.)  
Nederlando.  
Ĝironumero 209354 Nederlando.  
Tel. 10

Jarabono:  
Nederlando: 0.75 guldeno  
Aliaj landoj: 1 guldeno  
(1 gld. = 2,1 Sv. fr. aŭ 10 fr. fr.)

## Por progresintoj

### VINTRO.

Estis iam ŝafisto, kiu posedis kabanon sur unu el la pli malaltaj montoj, kiuj estas loĝeblaj dumsomere, sed tute ne en la vintro. La tutan someron li vivis tie kun la edzino, la infanoj kaj la ŝafaro, sed ĉirkaŭ la vintro ili iris malsupren al la valo, kie ne estas tiom multe da malvarmo kaj danĝero.

Je iu vespero, kiam la infanoj jam kuŝis en la lito, li diris al sia edzino: „Morgaŭ ni iros malsupren, ĉar la ĉielo promesas neĝon.” Tiuj vortoj plaĉis al la edzino, ĉar volonte ŝi estis en la valo, kie loĝis ĉiuj ŝiaj amikoj kaj parencoj.

„Ni do nun frue enlitiĝu,” ŝi diris, „ĉar se ni volos foriri, ni devos frue ellitiĝi.” Kaj ili manĝis la vesperan panon kaj enlitiĝis. Karo, la hundo, dormis apud la kuireja fajro; la patro, la patrino kaj la infanoj en malgranda mansardo.

Kaj dum la tuta tempo, kiam ili trankvile dormis, la neĝo falis amase, sed tiel senbrue, ke neniu rimarkis ĝin; eĉ ne Karo, la ŝafhundo, kiu en aliaj okazoj havis tian akran aŭdon.

Ekstere forte ekblovis la vento, kaj ĝi pelis la neĝon al la kabano de la ŝafisto kaj amasigis ĝin tiom alte, ke preteriranto tute ne pensus pri tiea domo. La kabano estis ĝispinte kovrita! Nur la plej supra randeto de la kamentubo elstaris super la neĝomonto.

Matene la infanoj vekiĝis je la kutima tempo kaj ekbabilis.

„Nu, dormu vi ankoraŭ iomete,” diris la patrino; „ankoraŭ estas tro frue por leviĝi; estas ankoraŭ ege mallume.” Kaj la infanoj silentis.

Sed post tempeto ankaŭ al la patrino la nokto iom tro longe



daŭris, kaj ŝi diris al la edzo: „Ŝajnas al mi, ke estas la tempo por leviĝi, kaj tamen estas tiel mallume! Ho, lumigu alumeton, kaj rigardu la horloĝon!” Tion faris la viro, kaj li vidis, ke estas jam post la oka! Nun ili komprenis, kial tiom longe restis mallume! La neĝo kuŝis alte super la fenestroj kaj sur la tegmento!

„Kion ni faru?” demandis la patrino. Kaj la kompatindaj infanoj ekploris, ĉar per la vintrovesperaj rakontoj de la pliaĝaj homoj ili ja sciis, kiom terure estas, se oni „enneĝiĝis.”

La ŝafisto ne perdis la kuraĝon. Li prenis longan stangon kaj per ĝi li faris truon en la neĝo, kiu kuŝis sur la kamentubo. Kaj la ĉielo nun estis videbla. Tiam li komprenis, kion fari. Li vokis sian hundon, la fidelan kamaradon, kaj Karo alflugis.

„Karo, Karo, vi sola povas nin savi,” diris la ŝafisto.

Li grimpis sur tablon, kiun li ŝovis sub la kamenon, prenis la hundon sur la brakoj kaj levis ĝin kiel eble plej alten en la kameno. La fidela, inteligenta besto tuj komprenis, kion la mastro deziras; ĝi tordis sin tra la tubo, flugis facile kiel plumo trans la neĝomonto malsupren, kaj baldaŭ trovis la vojon al la valo. Tie ĝi renkontis viron, kiu estis ĉe le mastro. Laŭte bojante ĝi alsaltis lin kaj poste suriris la monteton laŭ mallonga distanco.

„Kio estas, Karo?” demandis la viro. Karo svingis sovaĝe per la vosto, blekis kaj plende gratis per la antaŭpiedoj en la neĝo, kvazaŭ ion elfosante, kaj ree suriris la monteton mallongdistance.

La viro komprenis; montaranoj rapide komprenas tiajn aferojn.

„Ĝi certe perdis sian mastron en la neĝo,” li pensis, kaj diris: „Ni venos, kara besto, ni venos!”

Li iris por serĉi kelkajn kamaradojn, rakontis al ili la aferon, diris, ke ili kunportu pioĉojn, kaj tiel ekipitaj ili suriris la monton post Karo, kiu gaje bojante la vojon montris al ili.

Estis malfacila irado, ĉar la neĝo kuŝis en tiaj dikaj tavoloj, ke ofte ili devis fari ĉirkaŭvojon, kaj ĉiufoje riskis vojerari; fine ili tamen atingis la lokon, kie la kabano staris, kaj ili ekfosis.

La ŝafisto kaj la edzino aŭdis la akran bojadon de la hundo, kaj la obtuzajn voĉojn de la viroj, kaj ili diris dankeme: „Nun la savo estas proksima!”

Kaj tiel estis, ĉar la viroj sukcesis fari vojon tra la neĝo al la tegmento, en kiu ili faris malfermaĵon. Tra la truo ili tiris la tutan familion eksteren, kaj gvidis ilin rapide al la valo. Estis preskaŭ mallume, kiam ili alvenis, kaj la malfeliĉaj infanoj estis duonmortaj pro malvarmo. Sed la afablaj homoj gastigis la savitojn en siaj



domoj kaj donis al ili varman supon kaj varman liton. Ĉiu estis tre ĝoja, ke il estas ekster danĝero. Kaj Karo'n ili ne forgesis! Tiu ricevis en ĉiu domo, en kiu ĝi montris la ruzan nazon, ion por manĝi kaj afablan vorton. Precipe la infanoj amegis ĝin. „Se Karo ne estus tiel saĝa, ni ĉiuj estus pereintaj en la neĝo,” ili diris.

El la holanda: VANE.

### LA BIRDOJ EN NIAJ ĜARDENOJ.

En Nederlando ĉie en ĝardenoj kaj stratoj ni vidas paserojn. Ili restas en la proksimo de la domoj, ĉar ili scias, ke tie ili trovas ĉiam nutraĵon. Se oni je regulaj horoj ŝutas panerojn, restaĵojn de terpomoj, de fromaĝo aŭ rizo k.t.p., ili jam antaŭe kolektiĝas kaj atendas, ĝis oni donas la manĝaĵon. Estas kvazaŭ la birdoj rakontas unu al alia: „En tiun ĝardenon vi iru, tie ne estas danĝero!” Ĉar se komence oni vidas nur kelkajn, baldaŭ aperas multaj. Amuze estas, kiel ĉiam unu forŝtelas ion de alia, sed ĉiam en paco, ĉar ili trovas sufiĉe. Sed estu singarda! Zorgu, ke via kato estu en la domo kaj bone rigardu, ĉu la kato de viaj najbaroj ne estas en la ĝardeno.

Ĉar mi ne havas katon, mi ofte malfermas la ĝardenpordojn, por ke la birdoj povu enflugi la ĉambron por preni nutraĵon. Tion nur faras la plej kuraĝaj. Unu el ili, virpasero (kun nigra makulo sub la gorĝo) flugis ĉiumatene sur la tablon, kie staras mia matenmanĝo. Ĝi sidigis sin apud mia telero kaj manĝis la panerojn, kiujn mi ŝutis sur la tablotukon. Ĝi bone sciis, en kiu ŝranko staras la panujo kaj tuj flugis al la apuda benko, se la pano ne ankoraŭ estis sur la tablo. Ĝi havis bonan memoron. Aŭskultu!

En la vintro mi donas manĝaĵon por la birdoj ekstere tra la fenestro kaj la pordojn mi ne malfermas. Kiam mi en la printempo unuafoje malfermis la pordojn, tuj la birdeto flugis al la ŝranko kaj pepis, kaj pepis, ĝis mi malfermis la ŝrankon kaj donis panon al ĝi.

En la somero la birdeto malsaniĝis. Iun tagon ĝi estis en la ĉambro, manĝis iom, kaj falis flanken. Mi pensis, ke ĝi estas morta, sed post kelkaj minutoj ĝi ekstaris, kaj restis preskaŭ la tutan tagon en la ĉambro. La samon ĝi faris dum kvin tagoj; jen ĝi estis en la ĉambro, jen en la ĝardeno, de temp' al tempo ĝi denove falis flanken sed vespere ĝi flugis for. Tamen la kvinan vesperon ĝi eksidis sub mia skribotablo, metis la kapeton inter la flugilojn kaj ekdormis.



Kiam mi la sekvintan matenon venis en la ĉambron, ĝi sidis ankoraŭ sur la sama loko. Ĝi vekigis, manĝis ion, flugis for, revenis, falis, kaj denove ĝi ekdormis sub la skribotablo. Post kelkaj tagoj, kiam ĝi estis en la ĝardeno, mi aŭdis subite kriojn, kriegojn el centoj de birdgorĝoj, kaj mi tuj pensis: tio estas mia malsana birdeto; la aliaj paseroj mortpikas ĝin! Mi nome sciis, ke multaj birdoj havas la kutimon, mortigi malsanajn aŭ mortantajn birdojn kaj tiom longe bekpikas la kompatindan besteton, ĝis tiu estas morta. Kaj tiel estis! Mi ne povis helpi, ĉar la dramo okazis ekster mia ĝardeno en loko, en kiun mi ne povis penetri. Sed Otĉjo(n), tiel mi nomis la birdeton, neniam mi revidis.

(El miaj propraj spertoj)

Nederlando, Wassenaar.

· (daŭrigota)

A. E. S. MICHELSEN.

### PRI LA VIRO, KIU IĜUS VILAĜESTRO.

En nia vilaĝo loĝis iam kamparano, kiu metis je la pieda parto de sia lito kovantan kluk-kokininon.

Iun vesperon, kiam li kuŝis kun sia edzino en la lito, li diris al ŝi: „Ciska, se nia kluk-kokino elkovos dekdu kokidojn, ni aĉetos per tio kaprinon.”

„Bona ideo,” diris la virino, „kaj kiam la kaprino naskos, ni havos du, tri kapridojn.”

„Jes,” daŭrigis la viro, „kaj se ni tiam vendos niajn kapridojn, ni povos aĉeti per tiu mono bovidon.

„Kaj tiun bovidon ni povos breĉi, kaj kiam ĝi estos bovino kaj mem naskos bovidon, ni tiel akiros du bovinojn.”

„Certe,” respondis la viro, „kaj kiam ni tiam vendos niajn bovinojn, ni povos havigi al ni per tiu mono ĉevalon!”

„Estas vere,” diris la virino, „kaj tiam ni estos riĉuloj. Bona Dio! Kiu scias. Vi eble iĝos dum via vivo vilaĝestro. Sed, se vi iam iĝos tio, tiam atentu, ke vi ĉiam juste agu.”

„Kio?” demandis la viro duone kolere, „Ĉu vi dubas, ĉu mi juste agos?” Kaj kolere li subite ekstaris en la lito kaj kriis: „Ĉiam mi estos justa kaj ĉiuj estos egalaj je la leĝo!”

Malfeliĉe, li per la subita stariĝo renversis la korbeton de la kluk-kokino kaj ĉiuj ovoj frakasiĝis sur la plankon.

Kaj la bela vilaĝestr-eco estis ..... for.

Belgujo, Antwerpeno.

rerakontis JAN VAN SCHOOR.

---

Ĉiu abonanto rajtas ricevi unu binditan jarkolekton por 0,60 guld.



## JAPANA FABELO.



Estis iam du ranoj, japanaj ranoj. Unu loĝis en Kioto kaj la alia en Osaka. Kioto estis bona urbo por rano, sed Kioto ĉiam restis tamen Kioto, opiniis la rano el Kioto, kaj ĝi deziris vidi ion alian. Ĝi deziris vidi Osaka'n; oni diris, ke tiu estas belega — miraklojn oni rakontis pri tiu urbo.

Tiam diris la rano el Kioto: „Mi iras al Osaka, se necese, mi vojaĝos kiom ajn longe.”

La alia rano loĝis en Osaka. Ne ekzistas pli bona loko por rano, vi opinius! Sed Osaka ĉiam restis tamen Osaka, kaj la rano el Osaka deziris vidi ion alian. Kioto, tiu estis ja vere bela, oni rakontis al ĝi. Tiam diris la rano el Osaka: „Mi vojaĝas al Kioto, kiom ajn malfacila tio estu.”

Kaj estis malfacile, ĉar inter la du urboj estis monto kaj tiun oni ne povis ne transiri.

Hazarde okazis tiel: ĝuste kiam la rano el Kioto suriris la monton, sur la alia flanko ankaŭ la rano el Osaka faris sian unuan salton supren. Ili saltis kaj saltis, ili grimpis kaj grimpis, senfine longe. Kaj ŝajnis al ili, ke dum la grimpado la monto ĉiam pli alta fariĝas. — „Uf!” diris ĉiufoje la rano el Kioto. „Uf!” spiroblovis daŭre la rano el Osaka. „Sed mi ne rezignas, mi volas vidi Osaka'n”, diris unu kaj „Sed mi ne rezignas, mi volas vidi Kioto'n”, diris la alia.

Fine ili samtempe alvenis sur la montopinto. „Kvak!” diris unu. „Kvak!” diris la alia. Ili plu ne havis spiron, por diri ankoraŭ ion alian. — Tiam ili ekstaris sur la malantaŭaj kruroj: kaj ili rigardis, rigardadis al la piedo de la monto, kie Kioto kaj Osaka kuŝis.

Tio daŭris dum longa tempo, ĝis kiam la rano el Kioto subite diris: „Kvak! Nun vidu! Ĉio trompo! Osaka aspektas tute same kiel Kioto! Kaj ĝi estus tute alia kaj multe pli bela! Por tio mi saltante preskaŭ perdis la krurojn, kvak! Estas okazinte, sed neniam reel!” Tiam la rano ĉagrene sin returnis kaj grumblante ĝi malsupren saltis laŭ la monto al Kioto.

Kaj la rano el Osaka diris: „Kvak! Tio estas bela afero, ĉio trompo! Kioto precize same aspektas kiel Osaka, kaj ĝi estus alia



kaj pli bela. Por tio mi saltante preskaŭ perdis la spiron — okazis unufoje, sed neniam ree, kvak!” Kaj la rano el Osaka kolere sin returnis kaj murmurante ĝi saltis malsupren al Osaka.

Kaj tamen ..... Kioto kaj Osaka ne estis samaj, tute ne. Sed ja, kiam rano ekstaras sur la malantaŭaj kruroj, ĝi tenas la kapon malantaŭen. Kaj ĝiaj elstarantaj okuloj tiam vidas ne tion, kio estas antaŭ ĝi, sed kio estas malantaŭ ĝi. Kion la rano el Kioto de supre sur la monto vidis en la profundo, tio estis Kioto, de kie ĝi ĵus venis! Kaj kion la rano el Osaka vidis ĉe la piedo de la monto, tio estis Osaka. Sed la simplaj ranoj ne komprenis tion .....

VANE.


k	a	n	a	p	o
a	t	o	m	o	
n	o	v	o		
a	m	o			
p	o				
o					

Solvoj el No. 2.

### LA JUNA VIVO.

La premiojn gajnis ĉifoj: S.ro J. Krispyn, Amsterdamo, Nederlando; S.ro A. Brizzi, Pisa, Italujo; F.jno R. by de Ley, Drachten, Nederlando; S.ro A. Frolisék, Horni-Bojazovice, Ĉeĥoslovakujo.

Bonvolu sendi la solvojn al: Red. „La Juna Vivo”.



### NOVA ENIGMO.

La ciferoj, anstataŭitaj per literoj, signifas en konformaj vicoj, horizontale kaj vertikale:

1. Adverbon. 2. Beston. 3. Beston.

Riga, Latvujo.

B. REICHBERG.

Inter la sendintoj de la ĝusta solvo ni disdonos 2 premiojn. Ni akceptos solvojn ĝis la unua de Decembro.

### ATENTU!!

La redakcio urĝe petas al la eksterlandaj legantoj baldaŭ pagi la jarabonon (1 Julio '35—1 Julio '36) al la peranto en ilia lando. (Vidu paĝon 63).



## EKDORMAS LAG' ..... (SVISA POPOL-KANTO)

Ekdormas lag'en on-bro be-la . Si - len-tas bird'ek-mort-as  
tag, Kaj perflug-il - o plej malhela , Al-ven-as nok-to sur la  
lag' Al-ven-as nok - to sur la lag' .

Ho paca hor' de la vespero,  
Ripozon donas vi al hom'!  
Feliĉa sento pri l'espero  
Ekvibras nun en ĉiu dom'.

Geneve, Svisujo.

Ho dolĉa dorm' en la naturo  
Vi lulas nin post pena dev'  
Ĉagren' pro vi iĝas plezuro,  
En bela kaj feliĉa rev'!

trad. MAD MEVO.

(red.ino „La Semanto”)

(Metu post la kvaran noton punkton).

### LA DEVENO DE L'ARTA MUZIKO. (GREKA FABELO).

En antikvaj tempoj, longe antaŭ Homero, vivis juna paŝtisto, kiu paŝtis ŝafaron sur la herbo-riĉaj deklivoj de Parnaso. Iun tagon li tranĉis kanon, boris en ĝi truetojn kaj eltiris el ĝi sonojn de rava dolĉeco. Ĝoje li invitis la amikojn, ke ili faru la samon. Sed ili mokis lin: „Ĉu ne sufiĉas la kanto de l'birdoj, kaj la melodia voĉo de l'junulinoj? Por kio ni bezonas novan muzikon?” Sed la paŝtisteto persistis kaj la junaj paŝtistetoj el Parnaso iris por demandi la saĝulojn de Grekujo.

„Ho, respektindaj saĝuloj,” ili diris, „ĉu ebla estas arta muziko?”

Kaj la respektindaj saĝuloj, post longa meditado, karesante siajn blankajn barbojn, respondis fine per serioza voĉo: „Ne, paŝtistetoj, tia muziko estas neebla, ĉar ĝi neniam ekzistis, kaj eĉ, se ĝi estus ebla, ĝi estus kiel la lingvaĉo de l'barbaroj — nur sovaĝa miksaĵo, interfrakaso de sonoj, netolerebla por ĉiu delikata orelo.”

Triumfante revenis la paŝtistetoj al sia ŝafaro kaj ree mokis la tro genian kamaradon. Sed obstina li restis. Senhalte li tranĉis kanojn kaj senĉese invitadis al ludo siajn kunulojn. Fine ili konsentis kaj el la boritaj kanoj ankaŭ siavice eligis sonojn de rava dolĉeco ...

Tiel naskiĝis la arta muziko. Ĝi ne ĉesigis la kanton de l'birdoj, ĝi ne mutigis le melodian voĉon de l'junulinoj. Ĝi vivas, saĝuloj de Grekujo, kaj tiom longe ĝi vivas, kiom longe ekzistos homoj.



## LA DUDEK SEPA LECIONO.

## A. LA STRANGA PORDO.

Viro iutage (iun tagon) mezuris la pordon de la vilaĝa **drinkejo**. Li mezuris kaj kalkulis, mezuris **denove** kaj denove kalkulis. Dume popol-amaso kolektiĝis (kolektis sin) kaj rigardis la viron kaj liajn mezuradojn. Li estis **konata** viro, kaj la plej malbona drinkulo de la **loko**. Fine li diris al si mem:

„Kia stranga pordo! Ĝi estas nur du **metrojn** alta kaj unu metron larĝa. Mi iam havis belegan hejmon, ĝi eniĝis la drinkejon tra tiu ĉi pordo. Mi posedis domon kaj hejmon, belajn grenkampojn kaj herbejojn, ili iris la saman vojon. Kaj tamen la pordo estas nur du metrojn alta kaj unu metron larĝa! Ĉio, kion mi iam posedis:

bonstato, **honoro**, sano — ĉio traĝis tra ĉi tiu pordo. Estas nur mi, kiu jam ne povas eniri tra ĝi, ĉar mi ne havas plu monon.”

Polujo, Bydgoszcz.

El la nova lernolibro de prof. SYGNARSKY.

## B. ANEKDOTO.

La granda **angla humoristo** J. K. Jerome eĉ dum la malsano ne perdis la bonhumoron.

Iam li **vundiĝis** je brako kaj devis kuŝi en la lito. La kuracisto certigis, ke la afero estas ne-**komplika**, kaj ne estas kaŭzo por timi. Sed kun tima **mieno** demandis Jerome: „Ĉu mi post mia resaniĝo ankaŭ povos ludi pianon?”

„Certe”, respondis la kuracisto.

„Kia feliĉo por mi!” nun kriis la humoristo.

„Kial, kiel???”

„Ĉar mi ĝis nun ne povis ludi sur iu muzikilo.”

Schattendorf, Aŭstrio.

J. WIESBÖCK.

**C.** Paroladi = daŭre paroli; studadi = daŭre studi.  
laboradi; kantadi; dancadi; trinkadi; tiradi; **songadi**; legadi;

**D.** Parolo — parolado; kanto — kantado; trinko — trinkado;  
skribo — skribado.

- I. Lernu bone la novajn vortojn en A, B, C, D.
- II. Traduku A, B, C, D, en vian gepatran lingvon.
- III. Rakontu la historion pri „La stranga pordo” en via grupo.
- IV. Lernu parkere la anekdoton pri Jerome.
- V. Respondu al jenaj demandoj:



A. Kion mezuris la viro? Kiu kolektiĝis dum liaj mezuradoj? Kio estis la viro? Al kiu li parolis? Kiom granda estis la pordo? Kion la viro posedis iam? Kien ĉio eniĝis? Tra kio ĉio eniĝis? Ĉu sole **materiaj** objektoj eniĝis tra la stranga pordo? Kio traĝis krom tio tra tiu ĉi pordo? Kiu jam ne povis eniri tra la pordo? Kial?

B. Kiu ne perdis la bonhumoron? Kiam li eĉ ne perdis la bonhumoron? Je kio li vundiĝis? Kie li devis kuŝi? Kiu venis? Kion certigis la kuracisto? Kian mienon faris Jerome? Kion li demandis? Kion respondis la kuracisto? Ĉu la humoristo tiam estis feliĉa? Kion li diris?

## LA DUDEK OKA LECIONO.

### A. LA SEKALO-SPIKOJ.

Vilaĝano kaj lia filo iris al la kampoj por vidi, ĉu la **sekalo** jam maturiĝas. Ili venis al kampo, kaj rimarkis, ke kelkaj **trunketoj** kreskas rekte supren. Sed la plej multaj klinis la kapetojn teren.

„Estas domaĝe,” diris la filo, „ke nur malmultaj herberoj staras rekte. Jen vidu, patro, kiel fiere ili tenas la kapojn **ĉielen**. Oni devas bedaŭri, ke tiom multaj malsanas kaj **malserene** rigardas teren.”

„Vi eraras,” respondis la patro. „La **spikoj**, kiuj tiom multe fieras estas malplenaj kaj **neniel** utilos al ni. Sed la aliaj, la modestaj, kiuj kliniĝas teren estas plenaj de greneroj kaj de ili ni ricevas la bonan panon. Estas kiel ĉe la homoj. La plej modestaj kutime estas la plej utilaj, la plej fieraj homoj neniom taŭgas.”

### B. MULTVALORA DONACO.

Frico ricevis de la onklo ĉarman infantrumpeton. Post tri semajnoj la bona onklo ree vizitis la familion. Frico tuj alkuris lin.

„Kara onkleto, via trumpeto kaŭzas multajn ĝojojn al mi!”

„Kial, mia Frico?”

„Ĉiam, kiam mi ektrumpetas, la patrino donacas al mi dek groŝojn — **por ke mi ĉesu.**”

Schattendorf, Aŭstrio.

rerakont. WIESBÖCK.

- I. Lernu bone la novajn vortojn en A, B.
- II. Traduku A, B, en vian gepatran lingvon.
- III. Rakontu la historion pri la „Sekalospikoj” en via grupo.
- IV. Lernu parkere la rakonton pri „Multvalora donaco”.
- V. Respondu al jenaj demandoj:



A. Kiuj iris al la kampoj? Kion ili deziris vidi? Kion ili rimarkis? Ĉu multaj klinis la kapetojn teren? Kion diris la filo? Kion li bedaŭris? Kion respondis la patro? Kiuj spikoj ne utilas al la homoj? Kiuj spikoj estas modestaj? Kiuj estas plenaj de greneroj? De kiuj ni ricevas la bonan panon? Kiel estas ĉe la homoj? Kiuj ne taŭgas?

B. Kion ricevis Frico de la onklo? Kiam la onklo ree vizitis la familion? Kion Frico faris? Kion kaŭzis la trumpeto al Frico? Kial?

Uzu la jenajn vortojn en frazoj:

al, alie, ambaŭ, ankaŭ, apud, baldaŭ, ĉar, ĉe, ĉirkaŭ, ĉu, do, de, da, dum, eĉ, ekster, el, ĝis, inter, jen, ĵus, ke, ol, por, post, preskaŭ, pri, pro, sed, sub, sur, super, tamen, tre, tuj.

### SENPAGAJ ESPERANTAĴOJ.

**Polujo.** Samideanoj el la tuta mondo amase postulu informojn, prospektojn pri Varŝavo en Esperanto de *Zwiazek Propagandy Turystycznej m. st.* (Societo por Turisma Propagando en Varsovio), *Warszawa, Wierzbowa 8, Polujo.*

**Japanujo.** „Japanujo” estas la titolo de la nova gvidlibro kun 20 p. kaj 24 ravaj fotoj. Per tiu ĉi libro vi povos akiri etan konon pri Japanujo, kiu estas la lando maljuna kun historio de 3.000 jaroj, kaj kiu samtempe estas juna, vivoplena, moderna kaj industria lando. „Japanujo” estas akirebla *senpage*, do samideanoj en la tuta mondo senescepte, senprokraste, tuj skribu al la adreso, alie ĝi tre baldaŭ elĉerpiĝos. *Direkcio por Turismo* (Kokasai Kan-koo-kjoku) en Japana Fervoja Ministrejo Tokio, Japanujo.

**Nederlando.** La granda nederland-lingva semajna gazeto „Haagsche Post” ĵus malfermis Esperanto-lingvan rubrikon.

La redakcio de „Haagsche Post” anoncis internacian konkurson por ricevi taŭgan, trafan titolon por la Esperanto-rubriko. La titolo povas estis unu aŭ kelkaj vortoj en Esperanto aŭ en la nederlanda lingvo. La proponoj devas esti sendataj sur poŝtkarto ĝis la 15-a de Oktobro al: *Redakcio de „Haagsche Post”, Noordeinde 23, den Haag, Nederlando.* La plej bona solvo estos premiata per 25 ned. gld. Estas tre rekomendinde, ke multaj Esperantistoj el diversaj landoj montru sian intereson, partoprenante en la konkurso kaj gratulante al la redakcio. Al interesiĝantoj la redakcio disponigos kvanton de senpagaj specimenaj numeroj.

### ATENTU!

Ĉiu, kiu varbas 5 novajn abonantojn je nia revuo, ricevos donace „La Unuan Jarkolekton” de „La Juna Vivo”. Do multvaloran libron de proksimume 200 paĝoj.





Bonvolu rakonti la enhavon de ĉi tiuj kvar bildoj. Sendu la verkaĵojn al: **Red. „La Juna Vivo”, West-Graaftdijk, Nederlando.**

Al la sendintoj de la tri plej bonaj verkaĵoj ni donos 3 premiojn.

**Estas tiom da bono en la plej malbona el ni,  
Estas tiom da malbono en la plej bona el ni,  
Ke apenaŭ decas al iu el ni  
Juĝi la ceterajn el ni.**

El: „T. van den Brink en Th. Lancée, Onze eigen taal”, J. B. Wolters, Groningen-Den Haag-Batavia.



**KORESPONDADRESOJ: ĉiu vorto: 0,03 gld.**

**Al niaj abonantoj:** Ĉiu abonanto, aŭ grupo, havas la rajton enpresigi senpagan korespondadreson unufoje en la jaro.

**Ĉeĥoslovakujo:** Idealistoj, kiu el vi povas, sendu al Antonin Frolisék, en Horní Bojanovice, 1. p. Hustopece u Brna, propagandcele ĉiuspecajn esperantaĵojn! Antaŭan dankon!

**Hispanujo:** 15 jara hispana samideano dez. kor. kun gekamaradoj en la mondo, interŝanĝi I. K., gazetojn, ktp.: Josefo Huguét, Amirikan Bar, (Gerona).

**Hispanujo:** 15 jara knabo dez. kor. kun geamikoj en la mondo, pri ĉiu temo, interŝanĝi I. PK., leterojn kaj p. m., ktp. Certe respondos. Bonvolu skribi al: Emanuelo Cortada Pous, Monturiola Liceo, Figueras, (Gerona).

**Danujo:** S.ro Grönberg deziras por siaj lernantoj korespondadresojn el ĉiuj landoj. Skribu klare! Adreso: S.ro Grönberg, Loerer, Kattrup, Hasselager.

**Germanujo:** Oskar Nussbauer, Hannovro No. 1, Prinsenstr. 4, dez. korespondi.

**Nederlando:** J. D. Krispyn, 36 jara oficisto, Wognummerstr. 43, Amsterdam N., dez. kor. kun ĉiuj landoj. Precipe Afriko, Aŭstralio, Islando. Interesas sin pri relegio liberala.

**Nederlando** Fino T. Dekker, West-Grafdijk (NH), dez. kor. per leteroj kaj poŝtk. il. Precipe kun Japanujo. Respondo certa.

**Nederlando:** F.ino B. Visser, Nw. Waterweg, Haukes, Wieringen, dez. kor. kun ĉiuj landoj pri sporto.

**Nederlando:** J. Wiersma, v. Leeuwenhoekstr. 26, Leeuwarden, dez. kor. kun Afrikanoj, Aŭstralianoj aŭ Azianoj kaj interŝanĝi P. M. kun ĉiuj eksterlandanoj.

**Svedujo:** Bertil Löfgvist, 14 jara knabo deziras korespondi. Certe respondos almenaŭ unu fojon al ĉiu. Adreso: Uddensgränd 4, Visby, Gotland.



Grupo da esperantistoj, kiuj deziras korespondi. La grupo ricevis instruon nur duonan jaron. La sola lernilo estis „La Juna Vivo”. Ĉiu, kiu ŝatas esplori la taŭgecon de la metodo en la nomita gazeto.

Skribu al: F.ino Garms. No. 24. Kwadijk. Nederlando.



## RECENZOJ PRI „LA JUNA VIVO”.

„**Informilo de Zamenhof** (Jun.—Jul. '35). „La redakcio de tiu interesa kaj atila gazeto por infanoj kaj lernantoj de Esperanto, pri kiu ni parolis jam aliajn fojojn en nia Informilo, ĵus aperigis en libroformo ĵarkolekton de la dirita gazeto. Pro la formato kaj kombino de la gazeto, ĝi tre bone adaptiĝas al la bindo en tiu libroformo. La volumo konsistas el 196 paĝoj; ĝi enhavas multe da bildoj, instruaj desegnaĵoj, kantoj, enigmoj, k.t.p. Do ĝi estas rekomendinda kiel legaĵo por Esperanto-kursoj en la lernejoj .....”

„**Dansk Esperanto Blad**” (April 1935) ..... „Tre plaĉa gazeto por gejunuloj kaj komencantoj. La artikoloj estas bonegaj kaj en tre simpla stilo ....”

„**The British Esperantist**” (Sept. 1934) ..... La gazeto celas esti simpla, neŭtrala, interesa kaj malkosta. Ĝi estas agrabla ilustrita kaj bonstila. Ni rekomendas ĝin al lernejoj, kursoj, kaj ĉiu, kiu celas disvastigi Esperanton ĉe la infanaro. Oni petas alsendon de taŭga materialo: „la enhavo ne estu tro simpla rilate temon, sed la lingvaĵo kontraŭe, estu tre simpla (evitu kunmetitajn tempojn, longajn frazojn). La rakontoj prefere havu edukan valoron.”

„**La Suda Stelo**” (nr. 7-Sept. '35): „..... La sukceson pravigas simpla, nur malofte nekorekta stilo, simila lingvo kaj lerta redaktado. La ĉefrakontojn oni ĉerpis el la lernejaj legolibroj, sed ankaŭ la dezirindaj progresemaj artikoloj plimultiĝas. La libro enhavas ankaŭ plenan simplan kurson tre taŭgan por komencantoj .....”

„**Skolta Bulteno**” (Sept. '35) ..... „La ducentpaĝa volumo estas ja kontentiga lego- kaj lernolibro: bone presita sur bona papero, bone ilustrita, kaj bone bindita en arta kovrilo. Ni gratulas al la redaktoro kaj ni deziras pluan sukceson.”

„**La Lumturo de Esperanto**” (No. 55, Julio '35). „La Juna Vivo”, tute redaktata esperante estas la revuo, kiu plej multe respondas al la bezonoj de la junularo kaj ankaŭ al tiuj, kiuj komencas la studadon de ĉi tiu lingvo. La aŭtoroj, kaj tradukantoj estas preskaŭ senescepte geinstruistoj, konantaj la guston de infanoj, kaj scias elekti rakontojn, interesaj por la junaj legantoj.

„**Lingvo Internacia**” (1 Junio '35): „..... redaktata en bona kaj simpla lingvo, enhavas mallongajn kaj sufiĉe interesajn rakontojn kaj ekzercojn bonegajn por instruo de l'lingvo al infanoj .....”

## KOMUNIKOJ PRI LA GAZETO.

1. Dum la lasta monato la esperantistaj grupoj en jenaj lokoj enkondukis „La Juna Vivo”:

Svedujo: Tibro.

Nederlando: Leerdam (daŭrigkurso), Joure (daŭrigkurso), Callantsoog (daŭrigkurso), Beets (komenckurso por lernejinfanoj).

2. En „Argentina Esperantisto” (No. 112—113) aperis „Militema Filo” (el „La Juna Vivo” No. 11). En „Nova Sento” No. 43) aperis: „La Sciencisto” kaj „Fabelo pri la ŝakludo” (el „La Juna Vivo” No. 3(26)). Daŭrigu ĉi tiun laboron, ĝi estas multvalora! Sed ne forgesu mencii la redakcian adreson de „La Juna Vivo”.





Grupo da infanoj en West-Graafthijk (Nederlando).  
La infanoj ricevas instruon laŭ la metodo en „La Juna Vivo”.

#### KORESPONDADO.

**C. V.-E. (Angl.):** Tiu historio ŝajnas nereala al mi.

**P. F.-K. (Jugosl.):** Kun plezuro mi legis vian afablan karton. Certe mi ankoraŭ uzos unu el viaj enigmoj, mi tamen havas grandan provizon.

**J. v. Sch.-A. (Belg.):** La enhavo de viaj poemoj estas por pli junaj infanoj ol la legantoj de „La Juna Vivo”. Nia gazeto estas destinita por 12-16 jaraj gejunuloj. Tamen almenaŭ 70 % de la abonantoj estas plenaĝuloj.

**L.-V. (Franc.):** Vian rakonton ni presigos en la venonta numero.

**G. T.-S. (Ned.):** „La mastro kaj lia gasto” jam aperis en ekzerclibro por diplomo B. de Heilker.

**T. A.-W. (Ned.):** Certe la homoj estas kruelaj kontraŭ la bestoj, tamen mi ne povas enmeti vian rakonton, ĉar la legantoj certe trovos ĝin tro sentema.

#### ANEKDOTO.

„Joĉjo, se mi donus al vi dek ses nuksojn kaj vi devus dividi ilin kun via frateto, kiom ricevus li?”

„Ses”.

„Ĉu vi ne povas kalkuli?”

„Certe jes, sed mia frateto ne povas!”



**POLA ESPERANTISTO**

Monata Revuo de Esperantista Mova-  
do en Polujo kaj Eksterlando. Eldona-  
to: Pollanda Esperanto — Delegitaro.  
Redaktantoj: Prof. Dr. Odo Bujwid  
kaj Tad, Hodakowski. Abono por ek-  
sterlando: 5.— sv. fr. jare.

Redakcio kaj Administracio:  
K r a k ó w. Lubicz 34.  
Petu senpagan specimenon.

**Jarkotizo**

Aŭstrio .....	3.20 ŝil.
Britujo .....	3 ŝil.
Belgujo .....	17 fr.
Ĉeĥoslovakujo .....	16½ Ĉ. kr.
Danujo .....	3 kr.
Germanujo .....	1.75 M.
Hispanujo .....	5 pes.
Norvegujo .....	2.7 kr.
Polujo .....	3.6 zl.
Svedujo .....	2.70 kr.

**„FLORETOJ”**

Porinfanaj Rakontoj  
tradukitaj de la  
„**VENDREDA KLUBO**”  
en Winschoten  
(Nederlando)

Kun multaj koloraj kaj nigraj  
bildoj

de C. Jetses  
prezo ..... 0.70 ned. guld.

Aĉetebla en ĉiu librejo kaj ĉe la  
eldonisto:

**J. B. WOLTERS**

Groningen — Den Haag  
Batavia.

**Bonvolu sendi la monon por „La Juna Vivo”:**

*Ameriko:* Amerika Esperanto-Instituto, Madison. Wis., Usono.

*Anglujo:* The British Esp. Association, Inc. 142 High Holborn, London, W.C.I.

*Aŭstrio:* S.ro Scheibenreiter, Hermangasse 31/26, Wien VII.

*Belgujo:* Hendrik Rainson, Mechelen, Belga ĝironumero 335183.

*Ĉeĥoslovakujo:* L. J. Svoboda, Plzen, „U Zvonu” ĝironumero 14171 Praha.

*Danujo:* S.rino M. Jensen, Galtrup. Erslev. ĝironumero 44593.

*FranCUjo:* S.ro Matthieu, Dijon, 27 Place de la République, Côte d'Or.

ĝironumero: Cheque postal No. 12025. Dijon. (Côte d'Or).

*Germanujo:* Ewald Killmer, Schwabenweg 14, Wuppertal-Elberfeld. Germana  
ĝironumero: „Köln 104097”.

*Hispanujo:* S.ro Montserrat, str. Provenza, 75, 2°, 3°, Barcelona.

*Svedujo:* John Karlsson, Hylinge Norrköping. Sveda ĝironumero: 72295.

*Japanujo:* Ishiguro, Daita 1—784, Setagaya, Tokio.

*Ĉinujo:* S.ro P. Ĉan, Ĉina Mondlingva Librejo, 15 Shang Sieh Chiai, Peiping.

*Svislando:* S.ro R. A. Dasen, 19a, Avenue Riant-Parc, Genève.

*Jugoslavio:* Vilim Buk, Knjigotiskara, Sl. Brod. Ĉeko N.ro 37.556.

Oni povas pagi per eksterlanda poŝtmandato, 7 poŝtrespondkuponoj, ĝiro-  
konto, aŭ papermono en letero.

Se eksterlandanoj grupe abonas la gazeton, ili pagas nur la neder-  
landan abonprezon.



**E. P. C. LIBROJ**

estas la plej bonaj  
kaj la plej malmulte kostaj

**NIA ROMANSERIO**

prezo po 1,25 gld., afranko 0,19 gld.  
por bele-bindita libro

**LA DORMANTO VEKIGAS**

H. G. WELLS. Trad. A. F. Milward

**FANNY**

EDNA FERBER. Trad. Berno Fabo

**LUNO DE IZRAEL**

RIDER HAGGARD  
Trad. Payson kaj Butler

**LA ORA STUPARO**

E. P. OPPENHEIM  
Trad. Romford Esp. Soc.

**PINOKJO**

C. COLLODI. Trad. M. Marchesi

**QUO VADIS (VOL. 1)**

H. SIENKIEWICZ  
Trad. Lidja Zamenhof

**QUO VADIS (VOL. 2)**

H. SIENKIEWICZ  
Trad. Lidja Zamenhof

**RICA KAJ SEN MONO**

E. P. OPPENHEIM  
Trad. F. E. Wadham

**SI**

RIDER HAGGARD  
Trad. G. J. Degenkamp

**LA VIRO EL FRANCUJO**

IVANS. Trad. W. V. Graftdijk  
Aliaj sekvos

Eldonitaj de

**THE**

**ESPERANTO PUBLISHING CO. Ltd.**

Mendeblaj ĉe

**REDAKCIO „LA JUNA VIVO”**

**REKLAMTARIFO:**

1 paĝo: 15 gld.; ½ paĝo: 8 gld.; ¼  
paĝo: 4,5 gld.; ⅛ paĝo: 2,5 gld.

**KURSGVIDANTOJ!!!**

Vi deziras por viaj lernantoj mal-  
karan, praktikan esp. lego kaj lernoli-  
bron?

Mendu tuj la unuan, binditan jarko-  
lekton de „**La Juna Vivo**”, (200 paĝa  
libro en arta kovrilo). La prezo estas  
nur: 1,6 Sv. fr. = 0,75 gld. Grupoj  
ricevas rabaton.

Reklama oferto de

**KORESPONDA PAKETO**

enhavanta de 4 diversaj modeloj po  
dudek kartoj kaj dudek kovertoj, do  
160 bonkvalitaj korespondiloj.

Valoro hglđ 2.—; speciala prezo hglđ  
1.20 + 10 % sendkostoj.

H. E. O.

Soesterberg — Poŝkonto 88015

Abonu „**Verda Revuo**”. Sendependa  
gazeto pri arto, scienco kaj amuzo.  
Aperas monate. Jarabono 1,75 guld.  
Mendebla ĉe la administrejo: Wien  
VII, Hermannsgasse 31/26, Aŭstrio,  
kaj ĉe la redakcio de „**La Juna Vivo**”,  
West-Graftdyk, (NH), Nederlando.

Abonu tuj la monatan revuon

**„FLANDRA ESPERANTISTO”**

Interesa enhavo; facile komprenebla  
lingvo; aktuala, malmultekosta.

Jarabonon: 25 frankojn; 1,25 gld.

Novaj abonantoj anoncu sin ĉe:  
Flandra Ligo Esperantista, Kortryk.  
Poŝtĉeko: 2321.50.

Subtenu **La Junularlaboron**, mendu viajn librojn ĉe la redakcio  
de „**La Juna Vivo**”!